Jarkolekto : 2012 | Numero : 4 (suplemento) | Paĝo : 1

# La Voĉo de Amikejo

Informilo pri **Senlime** kaj **Esperanto** en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

BELGIO NEDERLANDO GERMANIO E

**Senlime**

Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno
Avec le soutien de la Communauté française

**En cas de non-distribution, renvoyer à**
H. Lentzen
Feldweg 20
BE-4701 KETTENIS
Tel. xx-32-(0)87-55.43.26
E-mail : lentzen@senlime.org

**Editeur responsable**
**Responsa eldonanto +**
**Informoj en la franca lingvo:**
Tel. +32-(0)87/33.02.92
GSM +32-486-947.957
Mail: jacques@senlime.org
Esperantista Grupo de Verviers
J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters
BE-4800 VERVIERS

**Informatie in het Nederlands**
**Informoj en la nederlanda:**
Tel. xx-31-(0)43-455.14.36
Mail: parren@senlime.org
P.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN

**Informationen auf deutsch**
**Informoj en la germana:**
Tel. xx-49-2406-7809
Mail: hogen@senlime.org
K. Hogen, Auf der Pief 22
DE-52134 HERZOGENRATH

**Aperas kvarfoje en jaro kaj rete elŝuteblas ĉe www.senlime.org**

**Prezoj por BE, NL kaj DE :**
**Unuopa n-ro : 4 EUR**
**Jara abono : 12 EUR**

Bonvolu pagi, prefere antaŭ la jarfino, **NUR** al la konto :
**979-5327148-10**
IBAN : BE41 9795 3271 4810
BIC : ARSPBE22
(banque : Argenta)
de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.

La jara kotizo al ***Senlime*** (10 €) estas disigita de la abono al la papera versio de nia informilo (12€).

## ENHAVO :

**p. 1 : Enkonduko**
**p. 2 : Kristnaska kariljona kanto**
**p. 3 : Ekspozicio pri sonoriloj**
**p. 4 : Jo Hazen, nia esperantista kariljonisto**
**p. 5 : Invito al kariljona Z-festo en Verviers**
**p. 6 : Sonorilaroj Verviersaj**

Kariljono estas sonorilaro ebliganta melodian ludon pli-malpli etenditan kaj varian laŭ la nombro de sonoriloj, 23 minimume por koncerta kariljono, helpe de klavaro(j). Do, humila sonorilisto fine iĝas virtuozo, eĉ improvizanto, okaze de festoj aŭ koncertoj.

La filmo «***Bonvenon che la Ŝti-oj***» favorigis novan kariljonan modon, sed koncertaj kariljonoj ekzistas ankaŭ ekstere de la franca urbo **Bergues** kaj de niaj flandraj urboj : 22 da ili nestas en Valonujo, inter kiuj 4 en la Lieĝa provinco.

Vervierso posedas la sian, kun 40 sonoriloj, en la preĝejo «Notre-Dame des Récollets» (detaloj en paĝo 6). La responsaj ludantoj estas Marie-Madeleine **Thonnard** kaj Gauthier **Bernard**. Oni povas aŭdi ilin kadre de la «aŭtunaj dimanĉoj», ĉiam en oktobro.

Jam de pluraj jaroj pasia teamo revivigas tiun belan Verviersan heredaĵon : purigado, necesaj riparoj, kaj, regule, organizado de koncertoj kaj kariljonaj vizitoj… Plue, ili volas taŭge festi la 75an datrevenon de ĝia konstruo.

Tiuokaze, la esperantista grupo de Verviers subtene invitas vin al speciala Zamenhof-festo en centrurba restoracio (proksima al la stacidomo), kun urba promenado, eta bankedo, sonorila kaj kristnaska koncertoj (detaloj en paĝo 5).

Poste, eblos (private) ĉeesti la benon de la sonorilo de la 75a datreveno (gisita dum nia lasta trilanda renkontiĝo, la 28an de oktobro) kaj diservon (en la franca lingvo – ni «vane?» proponis esperanton).

# The Bells of St Mary's

***Klasika kristnaska kanto el malpli fama samnoma filmo***

## La sonoriloj de Sankta Mari'

**(Kristnaska kanto)**

La sonorilaro de Sankta Mari',
Alvokas vin, kara, vi venu al mi.
Kaj scias mi bone ke apud la mar',
Vi ja min atendos ĉe l'rand de l'arbar'

***(Refreno)*** Aŭskultu, aŭskultu, la belaj amkrioj
Alvokas fianĉon per gojharmoni',
Kaj kiam ekfalos la ruĝaj folioj,
Jen sonas sonoriloj, por vi kaj mi.

Mi atendas ĉe l'pordo de Sankta Mari'
En vestaĵo kun blua rubando por vi:
De l'pregejo aŭdiĝas kantado de l'ĥor'
Por vi kaj mi sonas edziĝa sonor'.

***(Refreno)*** …

A. Emmelt Adams

El **Kantar-vikio**, la libera esperanto-kantaro
http://kantaro.ikso.net

En kantar-vikio vi trovos kolekton de kantoj en Esperanto kaj ĉion, kio rilatas al ili: nome tekstojn, notojn, ligojn al e-muziko en Interreto, kaj esperεble eĉ pli multe. Pli multe, ĉar ĉi tiu paĝaro estas ***vikio*** (kiel la reta enciklopedio vikipedio) kaj vi mem povas kontribui al ĝi.




**Tre bela ret-versio sur YouTube**

Ekzistas bela orkestra versio de la klasika kristnaska kanto, kiu ŝuldiĝas al Dan Soloky kaj la Cobblestone Symphony asocie kun Cobblestone Causes Foundation.

Tiu fondaĵo subtenas :
- MDA,
- St. Jude's Children's Research Hospital
- The American Cancer Society.

Bonvolu pensi pri tio rigardante al http://www.youtube.com/watch?v=QTvZdDQpK4g

Kaj…



***Ĝojan Kristnaskon***

***kaj***

***plej bonan novjaron !***

# Portempa ekzspozicio pri sonoriloj
# en MUZEO «RENIER»

## MUZEO PRI BELARTOJ KAJ CERAMIKO

### Konstantaj ekspozicioj

Situanta je la n-ro 17 de la strato **Renier**, ne fore de la preĝejo Sankta Remaklo, tiu muzeo prezentas multajn kolektojn da malnovaj pentraĵoj de artistoj Lieĝaj, flandraj, nederlandaj, francaj, italaj, anglaj kaj germanaj, pentraĵoj de belgaj majstroj el la 19-a jarcento, nuntempaj pentraĵoj, gravuraĵoj de la Lieĝa skolo.

Oni ankaŭ povas tie admiri skulptaĵojn kaj statuojn lignajn, tiel kiel belegajn kaj modernajn ceramikaĵojn.

### La konstruaĵo

Sen nombri la multnombrajn kolektaĵojn montritajn en tiu muzeo, la konstruaĵo en si mem atestis, tra la antaŭaj jarcentoj, pri granda parto de la urba historio. Komencita en 1661 kaj finita en 1664, tiu konstruaĵo estis la unua malsanulejo celanta al gemaljunuloj. Ĝi konservis tiun destinon ĝis 1880, kiam ĝi iĝis muzeo.

**Malfemo**: tel. xx-32-87/33.16.95

### Portempa ekspozicio

Okaze de la 75a naskiĝ-datreveno de la kariljono de la peĝejo Nia-Damo, de la 21a de oktobro ĝis la jarfino, viziteblos, en la keloj de la muzeo **Renier**, ekspozicio pri la sonoriloj de Verviers kaj ĉirkaŭo.

Ne nur eblos vidi sonorilojn (aŭ ilian foton) sed ankaŭ aŭd(ig)i ilin, ĉar la ekspozicio volis esti «interaktiva». Nepre vizitu ĝin !



La muzeo ankaŭ estas grava kultura loko en Verviers. Tie, ekzemple, okazas kurso pri arto kaj historio de la civilizacioj, far' Prof-ro Thierry Marthus, provinca prelegisto kaj mastro pri arta historio. La kurso invitas nin al tre kompleta travido de la civilizacio, bazita sur la plej freŝaj sciencaj malkovroj. Ĝin ilustras lumbildoj kaj eltiraĵoj el literaturaj kaj muzikaj verkoj. Presigita kurso kompreneble ankaŭ disponeblas.



Plejofte en la nunaj kariljonoj, la sonoriloj estas senmovaj kaj estas frapitaj pere de kablo konektita al levilaro kaj regostango kun klavaro (vidu sube). La produktita sono tiel estas varma kaj ĝiaj harmonikoj klare aŭdeblaj.



Kelkaj modernaj kariljonoj, kiel tiu de Loveno-la-Nova, nur aŭtomate, per elektronika sistemo (vidu sube), funkcias. Ĝenerale tiam eblus aldoni midi-klavaron, sed en tia kazo, la sono aperas nur iom post la premo de klavo, kio estas tre malfacila por la kariljonisto.



# Nia samideano **JO HAAZEN**

## (la belga dio de la kariljono)

Naskiĝinta en Antverpeno (Belgujo), la 24an de decembro 1944, *Jo Haazen* estas flandra muzikisto kaj fama kariljonisto studinta je la Reĝa Flandra Muzik-konservatorio en sia naskiĝ-urbo kaj je la Meĥelena Reĝa Kariljon-instituto “Jef Denyn”.

Li estis municipa kariljonisto en Antverpeno ekde 1968 ĝis 1981 kaj instruis muzikan edukadon kaj estetikon je la instituto por lingvoinstrudado, sekretariado kaj turismo “Van Celst”.

Krome li instruis Esperanton je la Antverpenaj Municipaj Lingvo-kursoj kadre de la programo por socia promocio. De 1970 ĝis 1975 li estis prezidanto de la Reĝa Antverpena Esperanto-societo “La Verda Stelo”.

Estinta la unua laŭreato de la 8-a, 9-a kaj 10-a Internacia Kariljonkonkurso en Hilversumo, Nederlando (1966-68), li iĝis unu el la plej bonaj kariljonistoj de sia generacio.

Liaj legendaj sonorilar-koncertoj el la turo de la Antverpena katedralo altiris milojn da aŭskultantoj. Depost 1965 Haazen funde renovigis la kariljon-arton en Flandrio kaj estas konsiderata eminentan sonorilaran fakulon.

Inter 1981 kaj 2010 li estis la direktoro de la mondfama Reĝa Kariljoninstituto “Jef Denyn” kaj municipa kariljonisto en la urbo Meĥeleno.


Li instruiĝis je la Reĝa Akademio Belarta en Antverpeno kaj je la Akademio pri Desegnado en Sint-Niklaas. Li okupiĝis pri arĥeologio kaj engaĝiĝis je la historiaj elfosadoj en Hannekeswerve (Aardenburg, Nederlando, 1964). Laŭ komisio de la Antverpena Provinca Konsilantaro li partoprenis je la elfosadoj de mezepokaj freskoj en la katedralo Sankta-Maria en Antverpeno (1973).

Li studis plurajn esoterajn sciencojn, eklernis la Hindan dancarton “Bharata Natyam” ĉe Jetty Roels (Dancstudio “D’Oude Kapel” en Gento, Belgujo) kaj fondis skolon, nomitan “Zonneschool” (Sunskolo), plurisma societo akcelanta individuan kaj socian konsciiĝon.

Li verkis kvinvoluman kariljonan instrumetodon, realigis plurajn ekzemplajn kompaktdiskojn kaj eldonis aron da eseoj kaj publikaĵojn pri kampanologio kaj filozofio.

Jo Haazen koncertis en multaj landoj. Li promociis la kariljonarton en Japanujo kaj Rusujo kaj nomumiĝis en 2003 titolulon-kariljoniston de la katedralo Petro-kaj-Paŭlo en la Ŝtata Muzeo pri la Historio de Sankt-Peterburgo.

Depost 2006 li estas profesoro en la Fakultato pri Arto (departemento orgena, klavicena kaj kariljona) de la Ŝtata Universitato en Sankt-Peterburgo kaj gastdocento en la Fakultato pri Komparaj Religiaj Sciencoj en Antverpeno.



En 1980 la Kalifornia Universitato, Berkeley (UŜ), honorigis lin per la ordeno “Honors of Music”.

En 1995 la Belga Ministerio pri Internaj Aferoj donacis lin la Civilan Ordenon Unua Klasa.

En 2000 li fariĝis Honora Eŭropa Senatano Pro Pace et Unitate, e meritu et honoris causa, (BVSE-UEF).

En 2004 li ricevis la honorigan diplomon de la urbo Sankt-Peterburgo kaj la Rusa prezidento Vladimir Putin honoris lin per la medalo "Ordeno de la Amikeco" pro lia “unika kontribuo al la revivigo de la muziktradicioj en la Petro-kaj-Paŭlofortikaĵo, siatempe kreitaj fare de la imperiestro Petro la Granda”.

En 2005 la "European Merit Foundation" transdonis al li en Luksemburgo la Arĝentan Medalon ”for his important activities in favor of Europe”.

En 2009 la Antverpena guberni-estro honorigis lin per la Premio Christoffel Plantin, alta ordeno altribuata al personoj kiuj eksterordinare kontribuis al la disfamiĝo de Belgio en la mondo.

Fonto : ***Vikipedio***

# Invito al speciala sonorilara Zamenhof-festo en Verviers

## Trilanda renkontiĝo

Vervierso posedas sian propran kariljonon, kun 40 sonoriloj, en la preĝejo «Notre-Dame des Récollets» (detaloj en paĝo 6). La responsaj ludantoj estas Marie-Madeleine **Thonnard** kaj Gauthier **Bernard**. Oni povas aŭdi ilin kadre de la «aŭtunaj dimanĉoj», ĉiam en oktobro.

Per internet, vi ankaŭ povas aŭdi (kaj eĉ iomete viziti) ĝin dank'al video de J-M Jacques, ĉe http://www.youtube.com/watch?v=Gr0cDfq06CM

Jam de pluraj jaroj pasia teamo revivigas tiun belan Verviersan heredaĵon : purigado, necesaj riparoj, kaj, regule, organizado de koncertoj kaj kariljonaj vizitoj… Plue, ili volis taŭge festi la 75an datrevenon de ĝia konstruo per aldono de nova sonorilo (fakte, eta «alvoka» sonorilo kerne de la preĝejo.

La esperantista grupo de Verviers finance subtenis ilin, pro kio, aperos la esperantista simbolo sub la sonorilo, kiu tiel iĝos dua ZEO en Verviers (la unua estas memorŝtoneto apud la fontano de la Verda Placo, tutproksime).

Okaze de la surloka gisado de la nova sonorilo, ni invitis niajn samideanojn el la tri najbaraj landoj (B-D-N) por kune festi tion kadre de speciala trilanda renkontiĝo.

Depende de la alven-dato de tiu-ĉi informilo ĉe vi, eble vi ankoraŭ povas aliĝi, se ne estas jam farite (limdato por la deviga antaŭpago de 30 EUR estis la 19a de oktobro – rendevuo je la 10a horo en la restoracio, 85 rue du Brou.

## Mapo




Aŭtomobilo, alvenu par la aùtovojo Battice-Prüm kaj eliru al Verviers-centro. Direktu vin al la (centra) stacidomo de Verviers dank'al la vojindikiloj. Tie estas parkloko por aŭtomobiloj dimanĉe senpaga (la urba centro estas grandparte ne plu enveturebla).

## Zamenhof-festo

La 16an de decembro, «la sonorilo de la 75a datreveno» estos benita en la preĝejo Nia-Damo, je la 18a horo, kadre de diservo en la franca lingvo (ni vane proponis esperanton…). Do (tamen) la Verviersa Esperanto Grupo invitas vin al Zamenhof-festo en Verviers.

**Provizora** programo :

Rendevuo en la centra stacidomo je la 10h30 por promenado tra la urbo aŭ je la 11h30 en la restoracio «Le jardin de Provence» por la aperitivo.
12h00 eta bankedo
14h15 foriro al sonoril-koncerteto piede de la preĝejo «Nia Damo»
15h00 kristnaska koncerto en la preĝejo far la harmonio el Aŭbel.
17h00 fino de la Z-festo, sed tiuj, kiuj tion deziras, povos ĉeesti la benon de la sonorilo kaj la diservon (aŭ viziti la muzeon).

Aliĝo bonvolu antaŭpagi la sumon da 40 EUR (tagmezaj trinkaĵoj surloke pagendaj), NUR al la konto 979-5327148-10 de ***Senlime*** (p.6).
Klare menciu la celon de via pago, kiu **nepre** alvenu plej malfrue la 7-an de decembro : ĝi ebligas vian partoprenon (aliĝilo ne necesas – eventuala repago principe neeblas).

**N-B**: por ambaŭ oranizaĵoj ni dependas de la «***Komitato de la 75a datreveno de la kariljono***». Jean-Marie **Jacques** rete (per la yahoo-grupoj kaj la ttt-ejo de Senlime) komunikos al vi la ĝisdatigitajn informojn kaj la definitivan programon kiam eblos.

Dankon pro via komprenemo!

# Verviersa Angulo

Verviersa Esperanto Grupo

# Sonorilaroj Verviersaj

(en la urbo-domo kaj en la preĝejo «Nia Damo»)

**Comité de V.E.G.:**

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: D. Lousberg
25 Rue Pierre Fluche
4800 VERVIERS
Tél. 087/22.20.30

Secrétaire: J.M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

V.E.G. dépend de l' Association pour l'Espéranto (A.P.E.)
Jean-Pol Sparenberg
20 Ruelle de Thuin
6540 LOBBES
Tél. 071/59.15.42

**Cotisations**

Les espérantistes et sympathisants sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant chaque année une ou plusieurs des cotisations suivantes au compte

**979-5327148-10**
IBAN : BE41 9795 3271 4810
BIC : ARSPBE22
(banque : Argenta)

de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.

*La cotisation de **Senlime** est obligatoire et fixée à 10 EUR. Ce bulletin d'information est intégré à la revue «Espéranto en marche», comprise dans la cotisation à APE.*

**D'avance, merci à tous !**

**A.P.E. 2012** (EGV) **25 €**
**U.E.A. 2012** (MA-T) **61 €**
***Senlime*** **(cotisation 2013) 10 €**

**Indiquez les nom, prénoms et domicile du membre cotisant ainsi que l'association bénéficiaire:**
***«cotisation de.... pour....».***

## La urbo-domo

La konstruado de la urbo-domo datiĝas de 1775. Ĝi havas la stilon Ludoviko la 16-a kaj estis farita el brikoj kaj kalkŝtono de la regiono. Ĝi estis renovigita en 2011.

La moto, gravurita sur la frontono de la ĉefa fasado "PUBLICITE SAUVEGARDE DU PEUPLE" [***Publikeco protekto de l'popolo***], datiĝas de 1830 kaj postsekvis blazonon de Nederlando (Malaltaj Landoj), post la belga revolucio.

Antaŭ la urbo-domo staras Lieĝa perono, simbolo pri aparteno al la iama Princepiskejo kaj libero.

La arkitekto estis **Renoz**, el Lieĝo.



En la centra tureto estas 21 sonoriloj gisitaj de la Meĥelena firmao Michiels. Tiu sonorilturo estas ekstere renovigita ankaŭ en 2011 sed la internaj partoj (sonorilaro kaj horloĝo) nur bezonis purigadon kaj kutiman prizorgadon.

La kariljono nur aŭtomate ludas ĉar ĝi ne estas dotita per klavaro.

## Preĝejo Nia-Damo



La statuo reprezentanta la Virgulinon kaj la Infanon estas tajlita el ŝtono de blanka sablo. La nuna nuanco estas la konsekvenco de la multaj incendioj kiuj damaĝegis la religian konstruaĵon dum la jarcentoj. La legendo de Nia Sinjorino de la Récollets, fondita sur multnombraj skribaĵoj de la epoko, estas rakontita en la kapelo instalita en la unua parto de la preĝejo.

Tiu konstruaĵo estas starigita en 1647 kaj la nuna turo estas renovigita en 1892. La sonorilturo ŝirmas kariljonon da 40 sonoriloj kun klavaro por kariljonisto. La kariljono kaj la sonoriloj, ankaŭ gisitaj de la firmao Michiels, datiĝas de 1937. La kariljono, malfacile ludebla pro la rezisto de tro malnova mekanismo, meritus renovigon…

Donacojn ricevas la konto de CARILLON N-D DES RECOLLETS
BE88 0688 9480 7041

Koran dankon al ĉiuj !